I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 7 - 8 - 9 Julio, Aŭgusto kaj Septembro 1959 9-a Jaro

## XXX-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

### FIRENZE, 19 - 24 de Septembro 1959

PROGRAMO

19 Septembro, Sabato - h. 20,30 - Gazetara Konferenco antaŭ la estrare de F.E.I.
h. 21,30 - Interkonatiĝa vespero.

20 Septembro, Dimanĉo
h. 9 - Katolika Diservo kun prediko de P. Jacobitti en S.Giovanni (Baptejo)
" 10,30 - INAŬGURO DE LA KONGRESO EN PALAZZO VECCHIO - Salutparoladoj de Aŭtoritatuloj, kaj de eksterlandaj reprezentantoj. Mesaĝoj. Oficiala parolado de Gr.Uff. Prof. G.Canuto Prezidanto de U.E.A.
" 12 - Komuna fotografiĝo (Ŝtuparo antaŭ Palazzo Vecchio).
" 12,30 - Malfermo de la Esperantista Ekspozicio
" 15 - Itala Instituto de Esperanto - Ekzamenkunsido (Skribaj ekzamenoj)
" 15,30 - Unua kunsido dei F.E.I. h. 21 - Vespero en Esperantujo.

21 Septembro, Lundo
h. 9 - Daŭrigo skribaj ekzamenoj. h. 9,30 - Dua kunsido de F.E.I.
" 11,30 - Oficiala akcepto fare de la Urbestro.
" 14,30 - Kunveno de I.L.E.I. h. 16 - Kunveno de U.E.C.I.
" 17,30 - Kunsido de ĝenerala konsilantaro de Itala Istituto de Esperanto.
" 21 - Vespero honore de Zamenhof

22 Septembro, Mardo
h. 9 - Ĝenerala laborkunsido - h. 11 kaj h. 14 - Fakaj kunvenoj.
" 14,30 - Parolaj ekzamenoj. h. 16 - Forveturo per rezervitaj aŭtobusoj al Forte Belvedere; akcepto, kaj vizito al la Ekspozicio de la deŝiritaj freskoj. h. 21,30 - Kongresa balo.

23 Septembro, Merkredo
h. 9 - Vizito de la urbo (Foriro de la Kongresejo per rezervitaj aŭtoj.)
" 14 - Parolaj ekzamenoj. h. 14,30 - Fakaj kunvenoj.
" 16 - Omaĝo ĉe la tomboj de la unua prezidanto de F.E.I. prof. Giuseppe Signorini kaj de Luigi Del Ro (Via di Soffiano 190).
" 19 - Fina fermo de la laboroj. h. 20 - Komuna bankedo.

24 Septembro, Ĵaŭdo
h. 8 - Forveturo per rezervitaj aŭtobusoj al Siena.
" 9,45 - Alveno en Siena kaj vizito al tieaj vidindaĵoj.
" 13 - Komuna tagmanĝo. h. 14,45 - Daŭrigo de la vizito.
" 17 - Akcepto en la Urbodomo. h. 18 - Forveturo. h. 19,45 - Forsalutoj.

Dum iu faka kunveno (la L.K.K. ankoraŭ ne fiksis en kiu) okazos la 9-a Nacia Kongreso de la Italaj Fervojistaj Esperantistoj. Ni alvokas ĉiujn niajn anojn, ĉeestu konsiderante la apartan gravecon de nia nunjara kongreso.

T A G O R D O: 1 - Raporto de la Sekretario kaj de la Kasisto
2 - Elekto de la nova estraro. 3 - Eventualaĵoj kaj diversaĵoj.

Raporto pri la Fervojista Esperanto-Renkontiĝo dum la 44-a U.E.A.-Kongreso
Varsovio la 3-a de aŭgusto 1959 en la granda salono de la Pola Trafikministerio

Okaze de 44-a Universala Kongreso estis okaziĝitaj multaj fakkunsidoj kaj prelegoj. Jam dum la lastaj U.E.A.-kongresoj okazis ankaŭ fervojistaj fakkunsidoj, aranĝitaj de koncernaj landaj I.F.E.F.-reprezentantoj kiel en Marseille (Lemonnier), ~~Mainz (Giessner)~~ kaj nun en Varsovio. Kolego Naworowski, jam dum la 11-a I.F.E.F.-kongreso en Linz, invitis ĉiujn fervojistajn U.E.A.-kongresanojn al tiu ĉi kunveno. Menciinde estas, ke la pollandaj fervojistaj gekolegoj, precipe la fervojistaj Esperanto-grupanoj de GDANSK estis ĉiam, dum la tuta kongreso en Varsovio helpeme je la dispono al la eksterlandaj fakkolegoj. La Prezidanto de la Pollanda Fervojista Esperanto-Grupo s-ano Erazm NAWOROWSKI ricevis la permeson okaziĝi la fakkunsidon en la salono de Trafikministerio; ĉeestis proksimume 100 partoprenintoj el Pollando, Hungario, Bulgario, Jugoslavio, Ĉ.S.R., D.D.R., okcidenta Germanio, Svedio, Finnlando, Norvegio, Danlando, Francio, Italio, Svislando kaj Aŭstrio.

Post la saluto la Prezidanto NAWOROWSKI, rekomendis elekti delegitaron laŭ ordo. Kiel Prezidanto oni elektis s-anon D-ro BACSKAI (Budapest), unua Sekretario Simono CSERA (Hungario), dua Prezidanto NAWOROWSKI kaj dua Sekretario L. ANGERMAYR (Aŭstrio). S-anino Elna SÖRENSEN (Kopenhago) salutis en la nomo de la Dana fervojistaro. Pluraj salutvortoj kun mallongaj raportoj estis parolitaj de s-anoj EERVOUET (Francujo), FORMAGGIO Aldo (Italujo), SCHMUTZ (Svisujo), OLSEN (Svedujo), WINGEN (Leipzig) kaj Inĝ. SEKERES (Jugoslavio). S-ano KAPITANY (unu el la plej diligentaj kunlaborantoj de D-ro BACSKAI) alvokis la partoprenantojn al vigla partopreno de diversaj Esperanto-aranĝoj en Hungario kaj por senĉesa varbado por Esperanto inter la fervojistoj. ANGERMAYR (Aŭstrio) diris i.a. Grave por ni Esperantistoj estas, ke ni trovas kontakton kun niaj fervojaj administracioj, sindikatoj kaj aliaj kulturaj instancoj kiel F.I.S.A.I.C., por ili oni pli facile gajnas la konfidon al nia kolegaro.

D-ro BACSKAI dankis al la Prezidanto de la Pola Fervojista Esperanto-Grupo s-ano NAWOROWSKI kaj al la Pollanda Fervoja Administracio, ke oni donis al la eksterlandaj samfakuloj la okazon pritrakti la komunan problemon fariĝi Esperanto kiel oficiala dejorlingvo en la internacia fervojtrafiko.

Kvankam ankoraŭ malhelpaĵoj kontraŭstaras la aranĝo de la 14-a I.F.E.F.-Kongreso en Budapest, D-ro BACSKAI tamen esperas, ke tiu kongreso estos la plej granda de la ĝisnunaj. Per tiuj esperplenaj vortoj li finis la kunvenon.

S-ano NAWOROWSKI faris fakprelegon pri "La evoluo de la Pollanda Fervojo"; ĉar tiu ĉi prelego vere estis tre interesa, li rikoltis grandan aplaŭdon.

Alian tagon s-ano NAWOROWSKI prezentis al la Ĉefestraro de la Trafikministerio la protokolon kaj la nomliston de la en- kaj eksterlandaj fervojistaj Esperantistoj, kiu kunlaboris dum la 44-a U.E.A.-Kongreso en Varsovio. Por eksterlandaj fervojistoj (ankaŭ al emeritoj), la Pollanda Fervoja Administracio donis senpagajn biletojn al Bialystok; krome senpagan bileton por la fervojista postkongresa renkontiĝo en Gdansk. La vigla kaj gastema fervojista Esperanto-grupo Gdansk preparis senpagan restadon por la fervojistaj postkongresanoj, du litvagonoj staris en la stacidomo, senpage por la eksterlandaj geamikoj.

GDANSK, iama Danzig estas preskaŭ nove rekonstruita laŭ malnova stilo; ĝies arkitekturo estas mirinda. Sur la 20 km. longa linio trafikas en interspaco de

10 minutoj, rapidtrajnoj, inter Gdansk, Sopot (la Pollanda Nice, eleganta banloko) kaj Gdinia (havenurbo). Dum niâ tritaga restado ni eluzis la okazon fari multajn komunajn ekskursojn en tiu ĉi belegan regionon. Ni ankaŭ vidis la ferian lokon de la pollandaj fervojistoj; situas en kontraŭ vent-ŝirmita valeto apud Sopot en proksimeco de la marbordo. La kolonio konsistas el proksimume 100 loĝvagonoj, ne surreloj sed fiksitaj, kie la pollanda fervojisto kun sia familio povas malmultekoste libertempi. Ankaŭ ni kaptis la okazon bani en orienta maro kaj elripozi sur blanka kaj mola sablo de la marbordo. Dum la lasta vespero de nia restado en Gdansk, en unu de la plej belaj modernaj hoteloj de Gdansk, okazis adiaŭan feston kaj ĝuis bongustan manĝadon. Dum la festeno okazis kortuŝaj paroladoj. La bulgara grupo samvespero forlasis Gdansk kaj sur la perono, antaŭ alveno de la trajno, okazis komunan dancadon laŭ bulgara maniero.

Neniam ni forgesos la belajn postkongresajn tagojn en Gdansk!

Luis ANGERMAYR - Sekretario de la IFEF-Sekcio Aŭstrio-Linz

## Al ĉiuj Esperanto-Grupoj Kiuj ricevos tiu ĉi Bulteno

Ĉiuj Esperanto-Grupoj de la mondo ĉeestos la Esperanto-Ekspozicion kiun la Bologna Esperanto-Grupo "Achille Tellini" intencas organizi en Bologna dum la venonta septembro, tuj post la Nacia Kongreso en Firenze.

Ĉeeston, personan kaj spiritan, simbole atestos fotografaĵoj de la Grupoj mem (kies membroj subskribos dorsflanke), por ke la posteulaĵo memoru la Esperantistojn de la unua Zamenhofa jarcento, kiel antaŭulojn de paca homaro ligita per unu internacia lingvo, unu menso, unu koro.

Post la Bologna ekspozicio la fotoj iros al Viena Esperanto-Muzeo.

Bonvolu sendi foton de Via Grupo laŭeble je formato 18x24, antaŭ la 15-a de septembro, adresante al Adv. Raffaele Bagnulo, Viale Gozzadini n° 7 Bologna.

## UNIVERSITATA PROFESORO D-ro EDMUND PRIVAT, PREZIDANTO DE UNIVERSALA LIGO, 70-J.

Paroli pri la vivo kaj agado de nia PRIVAT, la plej eminenta kaj lerta paroladisto en la Esperanto-movado, kiu festis la 17-a de aŭgusto sian 70-an naskiĝtagon, estus "strigojn sendi al Ateno". Kiam mi la unuan fojon aŭskultis la sorĉigan paroladon de nia Privat en la Universala Kongreso en Wien 1924, mi mirmiris, ke homo tiel eleganta, flue, kun konvinka forto kaj kun tia simpatia voĉo povus paroladi en nia lingvo kaj kiel ĝi ĉiuj aŭskultantoj plezure estus lin aŭskultantaj dum horoj. Kion li faris ĉe Ligo de Nacioj estas Esperanto-historio, neniam forgesebla!

Bildo de nia Privat pendas en la Panteono de Internacia Esperanto Muzeo en Wien por eterne. Gratuli ni deziras al amiko Privat kaj elpeti de la bona Dio longan, sanan vivon por la bono de nia ideo. Respekton al edzino Yvonne, kiu dum multaj jaroj lin helpis en lia laboro.

Steiner (el Informilo de I.E.M.W.)

## JAN KAJ JULJA ISBRUCKER KUNE JUBILEAS

50-jariĝis la tago, kiam niaj nederlandaj pioniroj Jan kaj Julja ISBRUCKER - li inĝeniero, prezidanto de nia Akademio, ŝi, fondintino de la Universala Ligo - fariĝis geesperantistoj. Li, kiel inĝeniero pri elektro-tekniko ekinteresis D-ron Privat al fondo de Radio-Genève en 1925 kaj kunvoki internacian konferencon de Radio-stacioj, kiun li prezidis senjare en Esperanto en Genève. Julja, sperta kiel kursestrino kaj aŭtorino de lernolibroj invitis Andreo CSEH al Nederlando, fondis Instituton kaj Esperanto-domon en Arnhem, kiu Cshe preparis taŭgajn instruantojn laŭ sia metodo. Dum 1928 ŝi organizis en Haag la Interreligian Kongreson por Paco. S-ino Isbrucker, pioniro de la mondfederalista movado, fondis Universalan Ligon kun Esperanto kiel sola oficiala lingvo.

Gesinjoroj Isbrucker tradukis kelkajn librojn en Esperanto. Al ambaŭ, la seriosa Jan kaj la ĉarma Julja, konataj figuroj en niaj U.K. ni dankas pro ilia ĝisnuna laboro kaj fideleco al nia afero kaj deziras al ili longan vivon en sano kaj kontento!

Steiner (el Informilo de I.E.M.W.)

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 Roma (Italia)
La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.). Ondlongoj: metroj 30,90 = Mc/s. 9,71; metroj 41,24 = Mc/s. 7,27 kaj metroj 50,34 = Mc/s. 5,96
Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA
merkrede: S-ro Luigi MINNAJA kaj vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA

DISSENDOJ EN ESPERANTO - Jaro 1959

SEPTEMBRO 1959 - Mardon la 1-an: Tra la literaturo - merkredon la 2-an: Kuriero de Esperanto - vendredon la 4-an: Giuseppe Giusti, okaze de la 150-a naskiĝa datreveno - mardon la 8-an: Italujo kaj filatelo - merkredo la 9-an: Kuriero de Esperanto - vendredon la 11-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 15-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - merkredon la 16-an: Kuriero de Esperanto - vendredon la 18-an: Novaĵoj el Italujo - mardon la 22-an: La Itala Ruĝa Kruco, okaze de la 100-a datreveno de la fondo - merkredon la 23-an: Kuriero de Esperanto - vendredon la 25-an: Italaj pentristoj: Raffaello - mardon la 29-an: Operaroj kantataj en Esperanto de soprano Angela Rositani - merkredon la 30-an Kuriero de Esperanto.

OKTOBRO 1959 - Vendredon la 2-an: Mistikaj lokoj en Italujo: la Verna - mardon la 6-an: Tra la literaturo - merkredon la 7-an: Kuriero de Esperanto - vendredon la 9-an: Leterkesto kaj bibliografio - mardon la 13-an: Kristoforo Kolumbo - merkredon la 14-an: Kuriero de Esperanto - vendredon la 16-an: Novaĵoj el Italujo - mardon la 20-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - merkredon la 21-an: Kuriero de Esperanto - vendredon la 23-an: Mortintaj urboj: Ostia Antikva - mardon la 27-an: Italujo kaj fremdaj verkistoj: Lord Byron - merkredon la 28-an: Kuriero de Esperanto - vendredon la 30-an: La kvina jarcento de la itala literaturo (la 17-a jarcento) -

La Fakestro: L. MINNAJA

Meritoj de Samideano BÜRGER en Linz, rekonitaj!

S-ano Burger, vicprezidanto de L.K.K. de la bonege sukcesita I.F.E.F.-kongreso nunjara, konstruis specialan "Sekurŝtupetaron" kun kolego Tischer, kaj ricevis jenan rekonon: S-ro emerita Fervojinspektoro Johann Bürger, Linz. En taksado de via dejorintereso, superata la kutiman mezuron de la devo-plenumo, estas aljuĝata al vi honorario de ŝil. 1000. Por la Generaldirektoro: D-ro Wust

Ni ĝojas kaj kore gratulas.

INVITO

Per tiu "Informa Bulteno" ni invitas la membrojn kaj simpatiantojn de nia Asocio al la 9-a Nacia Kongreso de la Itala Fervojista Esperanto-Asocio en Firenze. Krome ni invitas la estraron de I.F.E.F. kaj ĉiujn landajn Sekciojn de I.F.E.F. sendi delegitojn al tiu Kongreso.

NOVAĴOJ EL SAMPIERDARENA

Okaze de la jara kunveno de la loka Grupo por la elekto de la nova konsilantaro, S-ano GILARDI p.i. Giovanni, konsilanto de nia Asocio, fariĝis Prezidanto de la Esperanto-Grupo de Sanpierdarena. Ni kore gratulas al li!

FILATELAJ NOVAĴOJ

Okaze de la "Olimpikoj" en 1960, la Internacia Turisma Esperanta Centro (I.T.E.C.), Roma (Italujo), organizos "Internacian Kongreson". La gesamideanoj de la tuta mondo estas petataj postuli informojn kaj broŝurojn al: I.T.E.C. Studio-Roma Via Viminale, 31 Roma (Italujo) (el La Filatelisto)

Okaze de la Zamenhofjaro, Pollando eldonis du belajn Esperanto-poŝtmarkojn

Z A M E N H O F estas la nomo de Pola Ŝipo, konstruita en la Ŝipfarejo en Split (Dalmacio), kiu solene estis baptata kaj enmarigita la 12-a de julio 1959 por la Pola firmo "Polskie Linie Oceaniczne" en Gdansk. Baptopatrino estis s-ino Helene Grochulski, edzino de la Pola Ambasadoro en Beograd.